Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2014-37 sendita el Budapeŝto la 12an de aŭgusto.

PDF refarita en la 12a de novembro 2015 por aldoni la programon de la ĉina AMO-seminario ene de la PDF anstataŭ alkroĉite.

## Aktivula Maturigo, seminario en Ĉinio

La ĉefa celo de ĉi tiu komuniko estas sendi al vi (alkroĉite) la ĵus ricevitan detalan programon de la seminario pri Aktivula Maturigo (AMO), tuj okazonta en Siano, Ĉinio. Jen la plej longa seminario ĝis nun, kun admirinda kvanto kaj kvalito da gvidantoj, el pluraj aziaj landoj. UEA lasas al la organizantoj de tiuj alikontinentaj seminarioj grandan liberecon en la elekto de gvidantoj kaj temoj: la regionaj lokuloj konas pli bone ol ni la nunajn bezonojn kaj eblojn. Salutoj kaj kuraĝigaj mesaĝoj al ili bonvenas!

La tiam alkroĉita programo nun aperas en la lastaj paĝoj de ĉi tiu PDF-dokumento

## Aktivula Maturigo, ankoraŭfoje, alikontinente

Ĝuste en la ferma tago de AMO-4 en Ĉinio, ni inaŭguros la 81an Italan Kongreso de Esperanto en Fai della Paganella, apud Trento; kadre de kiu okazos AMO-5, kies detalan programon vi jam ricevis. Se ĉiu seminario devas nepre starigi rekordon, tiu en Siano estos la plej longa, sed tiu en Fai estos la plej alta, ĉar ĝi okazos en montara parto de Italio. Ĝin gvidos Stefan MacGill, Sara Spanò, Amri Wandel kaj Guilio Cappa. Sekvos ĉi-jare ankoraŭ du seminarioj, en Slovakio (novembre) kaj Togolando (decembre).

## Oficiala Trijara Postdiploma Studprogramo pri Interlingvistiko povas eki

Ni ege ĝojas anonci, ke estis arigitaj sufiĉaj aliĝoj al la kursaro en Poznano, Pollando por sekurigi ĝian ekfunkciadon meze de septembro. La limdato por aliĝoj estas la 15a de aŭgusto, do UEA, UAM kaj la aliaj multaj kunlaborintoj alvokas al vi: Restas nur **tri** tagoj anonci partoprendeziron aŭ firmigi jam deklaritan deziron. Tuj post la paso de la limdato, ni raportos pli detale pri la stato, kaj la paŝoj faritaj por atingi tiun sukceson. Egale gravas protekti jamajn atingojn kiel krei novajn!

## Seminario en Rumanio

Fine de septembro (tagmeze de vendredo la 26an ĝis 14.00h en dimanĉo la 28an) okazos la jam tradicia Simpozio de la Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) – la plej proksima evento al nacia kongreso en tiu lando – kaj ili tre ĝojos je pli internacia partoprenantaro. La kunvenejo situas sur monteta vilaĝa deklivo; temas pri kulturcentro/lernejo moderna, konvena, (tion mi kuraĝas aserti, ĉar antaŭ du jaroj mi partoprenis la aranĝon samloke) kun loĝigo kaj manĝado komuna kaj surloka.

Ĝi troviĝas ĉ. 30 km. norde de *Cluj-Napoca* (trajne kaj buse atingebla), kun apuda urbo *Gerla* (kie aktivas lerneja E-grupo). Kostoj estas (laŭ miaj normoj) ekstreme moderaj (€65 por registriĝo, loĝigo kaj ĉiuj manĝoj). Ni scias pri partoprenontoj el almenaŭ du najbaraj landoj – tre eble estos pli. Se iu de pli for decidos partopreni, bv. krome kontakti min (la sopiro je libroj el pli deforaj landoj estas grandega). *Cluj* havas flughavenon kaj stacidomon kun du rektaj trajnoj tage el Budapeŝto (informoj de mi); rabatflugoj ekzistas ĝis *Tigru Mures* (ne tro for). La foto montras Esperanto-grupon antaŭ la kunvenejo en 2012.




## Aliaj bolaĵoj

Ĉi-sabate la estraro de UEA reprenos, post UK, siajn kutimajn skajpkunsidojn. Dimanĉe okazos en landlima urbo de Hungario malformalaj diskutoj pri ebloj por regiona kunlaboro en la Suda Eŭropo. Post semajno, AMO-5 en Italio, tuj poste UEA reprezentiĝos en la plurnacia Esperanta delegacio ĉe la ĉi-jara Mez-Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica, suda Pollando (nia 'Davos'). Kadre de paneldiskuto eblos levi temojn, kiuj rilatas al lingvo-politiko en ĉi tiu mondparto.

Vortoj: 545

*AMO-3 UEA-Seminario Por Aktivula MaturigO*

# Orienta Esperanto-Seminario Xi'an (Siano)

**Temo**: Konsciigo, kapabligo, kaj praktiko de nia lingvo Esperanto.

**Dato:** Dum la 16a-23a de aŭgusto, 2014

**Loko:** Hotelo Jingjiang INN, Kangning-Lu Nro 6, Xi'an (Siano), Ĉinio.

**Organizanto:** Universala Esperanto-Asocio

**Gastiganto:** Xi'an-a Esperanto-Asocio

**Gvidantoj:** Trezoro HUANG Yinbao, Ĉielismo WANG Tianyi, Stalino YUAN Yongming, Miaohui, Nema PARK Yongsung (Koreio), Chimedtseren Enkhee (Mongolio), Usui Hiroyuki (Japanio).

**Kontaktoj:** chielismo@hotmail.com http://www.esperanto.cn/amo

**Utilaj Informoj**

SMG: En la originala cirkulero ĉi tie aperis praktikaj konsiloj por partoprenontoj. Mi forprenas tiujn informojn, ĉar mia celo estas nur konigi al vi la riĉan programon de nia plej longdaŭra AMO-seminario ĝis nun. Ni fidas, ke la organizantoj jam liveris al ĉiu partoprenonto la dokumenton kun tiuj konsiloj. Se al vi tio tamen mankas, tuj petu tion de la organizantoj. Efektive multaj el la seminarianoj jam troviĝas surloke por la ligita kursaro, kiu daŭras kvin semajnojn.

## Programo-tabelo de AMO-3 en Siano

| DATO | HORO | | |
|---|---|---|---|
| | 9:00 - 11:50 | 14:30 - 17:30 | **19:00-21:30** |
| **Sabato<br>16 Aŭg.** | | Registro<br>(Gvidantoj: Stalino Yuan, Wei Shan) | InterkonaVespero<br>*Gvidantoj:*<br>*Neĝeta SHI Xueqin,*<br>*Stalino YUAN Yongming* |
| **Di-manĉo<br>17 Aŭg.** | **Malferma Ceremonio**<br>1. Prezento pri la seminario (Trezoro);<br>2. Salutaj paroladoj (ĈEL, KAEM, ILEI, ĈIR, IFEF kaj reprezetantoj el Brazilo, Japanio, Koreio, Mongolio, Nepalo, Tajvana E-asocio ktp.);<br>3. Parolado de Xian-a Esperanto-Asocio (Ĉielismo);<br>4. Klarigo pri la ekskurso (Stalino Yuan);<br>5. Komuna foto (Devismo). | **Konsciigo kaj Movado** （I）<br>*(Gvidanto:PARK Yongsung Nema)*<br>1. *Wang Minhao:* Strategia Laborplano de UEA;<br>2. *Chimedtseren Enkhee:* Agado de KAEM kaj ĝia pluaj farendaĵoj;<br>3. *Usui Hiroyuki:* Interlingvistika provo ŝanĝi la publikan bildon pri Esperanto en Japanio. | Esperanta Kanto<br><br>(Gvidanto: Vadanto LU Jixin) |
| **Lundo<br>18 Aŭg.** | **Konsciigo kaj Movado (II)**<br>*(Gvidanto: Usui Hiroyuki)*<br>1.*Arko Gong:* Kiel praktike ni starigu kunlaboron internacie;<br>2.*Wang Minghao* ：Kiel organizi (gvidi) lokajn E-asociojn?<br>3.*Sanoza:*Pri la evoluo kaj reformigo de la Ĉina Esperanta Movado;<br>4.*Stalino Yuan:* Esperanto-Movado en Ŝanxi-provinco. | **Kapabligo kaj Edukado (I)**<br>*(Gvidanto: Ĉielismo Wang)*<br>1. *Aldrino* ：Kreado de novaj fakaj vortoj en internacia komerco;<br>2.*Usui Hiroyuki* ：Raporto pri la kanada AMO-seminario;<br>3.*GONG Xiaofeng:* Kiel efike altigi kapablon de E-instruantoj? | Ekskurso-01:<br>(senpaga)<br>*(Gvidanto: Stanlino Yuan)*<br>Pagodo Dajanta;<br>Muzika fontano;<br>Antikveska strato. |
| **Mardo<br>19 Aŭg.** | **Kapabligo kaj Edukado (II)**<br>*(Gvidanto: Miaohui)*<br><br>1.*Zhu Xueli:* Mi kaj Esperanto;<br>2. *Trezoro Huang:* Kiel lerni paroladon;<br>3. *Xing Qishuang:* Influado de instruista humoro en lingvinstruado;<br>4. *Zhuang Yating:* Konciza parolado pri la baza kvalito de E-instruisto. | **Praktiko de Esperanto(I)**<br>*(Gvidanto: Chimedtseren Enkhee)*<br>1. *Ĝoja Zhang Ping: Esperanto,* Turismo kaj Kulturo: Sperto el Prelegvojaĝo en Francio;<br>2. *Aldrino:*Kreado de novaj fakaj vortoj en internacia komerco;<br>3. *Zhao Wen-qi:* Esperanto kaj Antropologio;<br>4. *Miaohui:* Esperanto kaj budhismo. | Junulara Vespero |
| **Merkre-do<br>20 Aŭg.** | **Praktiko de Esperanto** （II）<br>*(Gvidanto: Trezoro)*<br>1. *Ĉina Radio Internacia:* Esperanto kaj radia elsendo;<br>2..*Ĉielismo:* Esperanto kaj Komerco; | **Ekskurso-02:**<br>*(nur trafika kosto)*<br>*(Gvidanto: Stanlino Yuan)*<br><br>1. Tagmanĝo en Hotelo Meihao (senpaga je12:00) | Esperanta filmo |

| | | | |
|---|---|---|---|
| | *3. Xiaoxiao:* Esperanto, Elektebla Vivmaniero;<br>*4. Xu Jie:* Bitmono kaj Esperanto.<br>*5. Li Xuelian:* Vidindejo de Montaro Ĉishan | 2. Centro de la urbo;<br>3. Islama strato.<br>4. Antikva muro de la urbo | |
| **Jaŭdo**<br>**21 Aŭg.** | **Historio kaj Literaturo (I)**<br>*(Gvidanto:Chimedtseren Enkhee)*<br><br>*1.Wen Jingen:* historio de ĉinaj propagandaj bildoj<br>*2.Ardo Hu Guopeng:* Eroshenko kaj liaj ĉinaj amikoj;<br>*3.Usui Hiroyuki:* William Auld, 'la poeto de la esperanta popolo' kaj liaj poemoj;<br>*5.Yu Jianchao:* Imitinda Rezonado, temas pri la argumentoj pri neologismoj inter T.S kaj Laŭlum. | **Ekskurso-03:**<br>*(senpage je trafika kosto )*<br>*(Gvidanto: Stanlino Yuan)*<br><br>1. Historia Muzeo de Shanxi-provinco;<br>2. Oficejo de Xi'an-a Esperanto-Asocio<br>3. Vespermanĝo kun Xi'an-tipaj manĝoĵoj (page laŭ libera mendo) | Ĉina Vespero |
| **Vendre-do**<br>**22 Aŭg.** | **Historio kaj Literaturo(II)**<br>*(Gvidanto:PARK Yongsung Nema)*<br><br>*1. Nema PARK Yongsung:* Fundamenta Krestomatio kiel ĉefa gvidilo.<br>*2. Aldreno:* Historio de la Esperanto-Movado en Brazilo;<br>*3. Pradip Ghimire:* Historio de la Esperanto Movado en Nepalo;<br>*4. Lu Jixing:* Poemoj en Esperanto. | **Prelego de aliaj proponoj**<br>*(Gvidanto: Usui Hiroyuki)*<br><br>**Ferma Ceremonio**<br>Resumo de AMO-3<br><br>Disdono de la diplomoj de la Somera E-Kurso. | Adiaŭa Vespero |
| **Sabato**<br>**23 Aŭg.** | **Ekskuro-04:**<br>*（200 juanoj + trafiko）*<br>*(Gvidanto: Stanlino Yuan)*<br>Muzeo de Terakota Legio<br>*(laŭ mendo)* | 1. Foriro de la seminarianoj. | |

Loko: Hotelo Jingjiang INN, Kangning-Lu Nro 6 Xi'an,
西安火车站坐乘351,602 ,607路公交康宁路站锦江之星幸福路酒店。
西安北站乘地铁到小寨站乘400双层公交到康宁路站锦江之星幸福路酒店。